

Numero: 245.  
Oktobro: 2012.

20-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbela@t-online.hu](mailto:espbela@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

# Lingvokursoj

Ĝenerale en la aŭtunaj monatoj multaj homoj komencas lerni lingvojn. Ankoraŭ vigle vivas en ni la memoro de la someraj, eksterlandaj vojaĝoj, kiam vizitante fremdajn landojn ni renkontiĝis kun la manko de la nekono de lingvoj.

Ankoraŭ dum la vojaĝo ni promesas al ni mem, ke hejmenalveninte ni tuj ellernus iun mondlingvon por ke en la estonto ne okazu ĝenaj situacioj, se ni malfermas nian buŝon.

Sed kiun lingvon?

Kompreneble, ni deziras ellerni tiun lingvon, kiun oni parolis, kie ni estis. Aŭ iun mondlingvon pri kiu ni opinias, ke ĝi estas disvastiĝinta en la tuta mondo.



Dum la longaj aŭtunaj vesperoj ni revadas pri la lernota lingvo, kaj antaŭ niaj animaj okuloj ekaperas la estonto, kiam ni ne plu havos lingvajn problemojn, ni povos komprenigi nin.

Tiuj ĉi belaj sonĝoj instigas nin lerni.

Matene ni tuj ekiras por serĉi konvenan lingvokurson esperante, tie ni povos ellerni la elektitan lingvon dum kelkaj monatoj.

Tiam venas la glacia akvo sur nin, kiam ni sciiĝas pri la pipra prezo de la lingvokurso. Krome ni devas aĉeti lernilojn: librojn, vortarojn, kajerojn kaj similajn. Tio ege malpezigas nian monujon, kaj ankoraŭ mi ne menciis aliajn malfacilaĵojn.

Ni forgesiĝas pri lingvo, kiun ni povas ellerni memstare kaj malmultekoste.

Tiu ĉi lingvo estas ESPERANTO. Se ĝi disvastiĝus, tiam en la mondo solviĝus multaj lingvaj malfacilaĵoj.

Se la lernanto estas sufiĉe diligenta, tiam de aŭtuno ĝis la sekva somero tiu ĉi lingvo estas ellernebla.

La homaro devus akcepti ĝin, kiel neŭtrala, facile ellernebla lingvo.

Ni, geesperantistoj klopodu, ke la zamenhofa lingvo fariĝu la dua gepatra lingvo de la homaro. Por ke tiu ĉi sonĝo realiĝu, ĉiu homo devus malfermi la pordon, kaj lasi enveni Esperanton-

-Redaktanto-



# Du homoj babiladas

--Kiujn lingvojn vi lernis?

--Ĉu devigite, aŭ memstare?

--Devigite.

--En la bazlernejo mi lernis la rusan lingvon kvin jarojn.

--Certe nun vi perfekte scias ĉi lingvon. Ĉu ne?

--Vi eraras. Vane mi lernis ruse, hodiaŭ mi scias el ĝi preskaŭ nenion. Mi forgesis la lernitan lingvon.

--Ĉu vi neniam uzis ĝin en praktiko?

--Unufoje mi ekprovis, sed sensukcese. Mi ne povis komprenigi min.

--Rakontu, kiel okazis!

--Mi feris ĉe la Balatono kaj renkontiĝis kun polino. Pensante ke per la rusa lingvo mi povos komprenigi min. Ja ankaŭ la pola estas slava lingvo kaj certe la bela polino komprenos min. Komence tio ŝajnis glata afero, kaj mi ekamindumis. La prezentiĝo okazis sukcese. Mi eksciis baldaŭ, ke ŝi nomiĝas Jadviga, kaj loĝas en la belega, historioriča urbo Krakovo. Bedaŭrinde post la sukcesa konatiĝo mi mutiĝis. Mi nur balbutis. Apenaŭ mi povis elbuŝigi kelke da bagatelaj vortoj.

--Kio okazis poste?

--Kio okazis? Nenio. Ni ne povis komuniki. Fine la bela polino malaperis, forlasis min.

--Kial vi ne provadis per alia lingvo? Eble ŝi sciis angle aŭ germane.

--Bedaŭrinde neniu lingvon komunan ni parolis. Vane mi provadis. Ŝi ripetadis ion. Mi ne sciis, kio ĝi estas.

--Kio estas tiu ĉi vorto? Eble mi povas traduki.

--Se mi ĝuste memoras, tiu vorto aŭdiĝis simile. Sed eble mi eraras.

--Nu, diru jam!

--Esperant, aŭ esperantki. Ĉu vi scias, kio ĝi estas? Mi ankoraŭ ne aŭdis ĉi vorton. Mi ne scias, kion ĝi signifas.

--Ankaŭ mi ne aŭdis ĉi vorton. En kiu lingvo ĝi estas? Al neniuj lingvoj ĝi similas. Esperant, esperantki, kio ĝi estas? Kial ŝiris tion tiu ĉarma polino. Estus bone scii. Ĉu ne?

--Mi konsentas. De kiu ni povus demandi, kion ĝi signifas?

--Mi ne scias. Ne gravas. Jam mi forgesis ŝin. En la estonto mi ellernos lingvojn por ke mi ne travivu similan ĝenan situacion.

--Bonega ideo. Ni lernu fremdajn lingvojn!

--Do, ek al la lingvolernado!

-Ŝaŝa-



# Maljunulino

Delonge ŝi jam sidis sub la granda juglandoarbo kaj amare ploretis. Sian vangon ŝi kaŝis en siajn sulkajn manplatojn. Ŝia robo estis malhela kaj neluksa.

Ĉirkaŭ ŝi la kokinoj skrapadis sur la korto La koko, kiel grandsinjoro rigardis kontente siajn subulojn.

Sed nun tio ne interesis la maljunulinon.

Ŝi ploris. El ŝiaj okuloj fluis la larmo, kiel rivereto. Kelkfoje ŝi ekĝemis.

Kio estis ŝia granda malĝojo? – Neniu sciis. Ŝi ne malkaŝis tion.

Verdire en la domo estis neniuj krom ŝi. Tie ĉi ŝi vivis sola. Ŝia edzo jam delonge forlasis ŝin. Li kuŝas en la tombo de la proksima tombejo. Ŝi sentis, ke baldaŭ ŝi sekvos lin.

Ŝi ne ŝatis vivi. La vivo estis por ŝi dolora kaj malgaja. Kvankam antaŭ multaj jaroj, kiom ŝi ŝatis la vivon. Ŝi ĉiam ridetis kaj kantis. Pro ŝiaj kantoj estis laŭta la domo. Ŝia edzo nomis ŝin: mia ĉarma najtingalo.

Forpasis tiuj belegaj jaroj. Anstataŭ ili nun estas terura malheleco. Ŝi ŝatus liberiĝi de ĝi, sed ŝi sentas, ke tiu ĉi monstro tiregas ŝin pli profunden. Ŝi jam ne povas liberiĝi de ĝi. Fine la mondo ĉesos ekzisti.

Kia estos la neekzistanta mondo? – Tion ŝi tie sub la juglandarbo ne povis imagi.

Ĉu ankaŭ en la ĉielo ŝi estos maljunulino aŭ ŝi rejuniĝos kaj denove ŝi estos feliĉa?

Ŝi ne sciis.

Ŝi nur ploris, eĉ ploregis. – Neniu vidis kaj konsolis ŝin. La kokinoj indiferece kuris preter ŝin. En la proksimo estis neniuj. La vilaĝo ankoraŭ neniam estis tiom silenta. Kvazaŭ nur ŝi estus loĝanta tie ĉi.


Malvarmeta vento kuris tra la korto kaj la maljunulino ekstremis. Malrapide ŝi levis sian vizaĝon al la ĉielo, sed en la sekva momento ŝi denove kaŝiĝis en siajn manpletojn.

En la malproksimo la bruo de traktoro estis aŭdebla, sed baldaŭ ankaŭ ĝi mutiĝis. La koko longe kokerikis je kio la kokinoj rapide diskuris.

Post iom da tempo ĉio estis la malnova, nur la ĝemado de la maljunulino aŭdiĝis.

Neniu sciis kiom longe ŝi sidis tie. La najbaro trovis ŝin jam mortintan. La alvenanta kuracisto jam ne povis savi ŝin.

Ŝi estis nur sola maljunulino, kiu antaŭ multaj, multaj jaroj estis belega kaj feliĉa, sed nun jam la jaroj forflugis super ŝia griza kapo.



-kata borbás-

# Pri imaga vojaĝo

-Fantasta rakonto-

III.

Nin atendis riĉa tablo kun multaj bongustaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Ankaŭ kiel vidaĵo la tablo estis belega. Certe la kuiristo estis vera artisto, ĉar li sorĉis al la manĝotablo eksterordinarajn vidindaĵojn.

Ili altabliĝis kaj mute komencis manĝi. Ankaŭ la gastiganto estis silenta, kaj nur malofte ĵetis amikeman rigardon al mi, kaj ekridetis afable.

Mi estis tre malsata, kaj avida manĝegis. Post kelkaj minutoj, kiam mia stomako iom pleniĝis, mi trankviliĝis kaj sentis kontentecon en mia korpo.



Ankaŭ la trinkaĵoj estis bonegaj. Ili estis neĉiutagaj. Prefere mi trinkis, eĉ drinkis francan ĉampanon.

Ĝi kuraĝigis min kaj post la tria aŭ kvara glaso mi demandis:

--Kial mi estas tie ĉi? Bonvolu informi min, mi petegas.

Barono Bonfarulo ĉesis la vespermanĝon kaj viŝis sian vizaĝon per bele brodita buŝtuko. Li trinkis glaseton da vino kaj li ridetante diris:

--Kiel mi jam menciis al vi, mi havas artefaritan insulon, kaj nun ni veturos tien. Vi povos partopreni eksperimenton. Por ĝi vi estis elektita tute hazarde. Vi estas bonŝanculo.

Mi ektemiĝis kaj la manĝosalono komencis turniĝi kun mi. Eble tion kaŭzis multe da ĉampano aŭ la rekono, ke li uzos min en sia eksperimento, kiel laboratoria leporo. Kia sorto atendas min alveninte la insulon?


Mi ege timis, kaj serĉis la okazon por rifuĝi el tiu ĉi ĝena situacio. Sed mi ne sciis, kiel. Ja mi estis sur la ferdoko de marŝipo meze de la oceano. Ĉie ĉirkaŭ mi estis akvo, eĉ en la fora malproksimo ne estis videbla tero. Vana provado estus naĝante forlasi la ŝipon. Se tamen sukcesus salti en la oceanon, en kiun direkton ekiri. Senespera estis mia sorto.

Dume ni finis la manĝadon. Barono Bonfarulo ekstaris kaj ekcigaris, kiel kontentulo, kies plano sukcesis kaj portas hejmen la ĉasaĵon.

Mi sentis min ĉasita sovaĝbesto, kiu en kaĝo timege atendas sian sorton.

Min interesis, kian eksperimenton mi partoprenos, sed mi timis demandi tion.

(- daŭrigota -)



# Poezio

Antaŭ dek jaroj mortis la poeto de la supra poemo (muzikigita kaj aperinta en tiu formo en nia nuna numero) kaj multe da aliaj klasikaj esp. verkoj. Hendrik Adamson verkis ankaŭ en la estona lingvo; li estis rekonita verkisto en la estona literaturo. Liaj esp. prozaĵoj ne estas multaj, sed ilia realismo indikas de si mem la tutan, ĉiam kaj ĉie validan vivon. (*Aŭli* -- eld. de Literatura Mondo, *Arbarbieneto* -- aperinta en Literatura Mondo 1935/1). Sed Adamson aperas kun sia plej artisme magia virtuozecko en siaj poemoj. La instinktan kaj motivitan pesimismon de la malsana kaj mizere vivanta poeto en la ombro de la historiaj okazaĵoj en lia lando riĉigas en iu kortuŝa maniero la optimismo kaj la vivosaĝo de alta spirito.

Ferenc SZILAGYI


(Fonto:  
[http://donh.best.vvwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/np/np5602/ni\\_gxojuu.html](http://donh.best.vvwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/np/np5602/ni_gxojuu.html))

## Ni ĝoju de Hendrik ADAMSON

Ni ĝoju sen ĝojo,  
ni kantu sen gajo  
kaj iru danĉpaŝe sur viv-vojo,  
ĉar kantoj kaj dancoj  
forigas laciĝon,  
pliigas kuraĝon,  
ni ĝoju!

Ni ĝoju sen ĝojo,  
ni kantu sen gajo,  
ĉu vintro, aŭtuno, por ni estu majo,  
kun floroj, bordĥoroj  
kun nura trilado  
kaj suna brilado,  
ni ĝoju!

Ni ĝoju sen ĝojo,  
ni kantu sen gajo,  
kaj se eksilentos por ĉiam ni foje,  
ne estu ja plendo tuj antaŭ silento,  
sed kanta birdĥoro  
en lasta stertoro,  
ni ĝoju!



# Poezio

## Vee de Hendrik ADAMSON

En tutmondtumulto mi mutas,  
iĝinte la nura observ',  
larmglutas, samtempe sangsputas --  
malsanas kun plena verv',

En mondpilgrimado enigmas  
la senc' de l' vagado kaj cel',  
feroce la vivo nin stigmas  
al frunto por morta elpel'.

La penoj plej noblaj ja vanas,  
hiehias, hahaaas harpi',  
en larmoj, en sango sin banas  
mokante pri jod' kaj ĉarpi'.

Ho, kiel kadukiĝis homeco  
kaj kiel plifortiĝis bestec'  
ĉe domoj -- ho ve! -- sendomeco,  
por idoj de l' Hom' sennestec'.


Homidoj -- la samaj birdidoj, --  
kantemas kaj penas al alt',  
sed larmaj ĝuiĝas la ridoj  
kaj rompas flugilojn la salt'.

## Ŝi

## de Hendrik ADAMSON

Hararo via, sukceso,  
okuloj nigraj, agat',  
fajreroj en ili, rubenoj  
kaj lip', el karn' de granat'.

Manetoj sen dub' alabastraj,  
unget' kvazaŭ rozpetal',  
briletas vi astr' inter astroj,  
el plej multekosta metal'.



# Por infanoj

## Malsana birdeto

En granda arbaro sur alta arbo loĝis birdeto en nesto. Ĉiutage ĝi gaje flugadis de arbo al arbo, kaj ĝi gaje triladis amuzante la aliajn bestojn de la arbaro. Tial ĉiu tre ŝatis la birdeton Vekiĝante la bestoj tuj atendis ĝian gajan voĉon.

Sed en iu tago okazis terura afero. La arbaro restis muta. La birdeto ne ekkantis. La bestoj vane atendis ĝin.

Ili malgaje demandadis unu de la alia:

--Kio okazis? Kial ni ne aŭdas la triladon de la birdeto?



Neniu sciis la kaŭzon, kial ĝi eksilentis. Dum la tuta tago la arbaro estis muta, kaj la bestoj estis malbonhumoraj.

Ili petis la lertan sciuron, ke ĝi saltadu supren de branĉo al branĉo kaj ĝi rigardu la neston.

La sciuro volonte plenumis la peton. Ja ankaŭ por ĝi mankis la admirinda trilado.

--Bonan tagon! – ĝi diris atingante la neston – Kara birdeto, kio okazis al vi, ke vi ne kantas por ni?

En la nesto sidaĉis la birdeto kaj ĝi apenaŭ povis ekparoli:

--Mi estas tre malsana – ĝi pepadis amare kaj malforte. – Eble mi mortos, se vi ne helpas al mi.

La malgranda besto tre ektimis, kaj ĝi tuj kuris al la atendantaj bestoj malsupren.

--La birdeto estas tre tre malsana – ĝi diris malgaje. – Ni tuj devas alvoki kuraciston al ĝi. Se ni ne helpas, la birdeto mortos.



La bestoj kuregis al la strigo por peti konsilon, ĉar ĝi estis la plej saĝa el la bestoj.

--Mi ne povas kuraci ĝin – diris malgaje la strigo kiam ekzamenis la birdeton. – Vere mi konas multe da malsano, sed nun mi ne povas helpi. Mi proponas al vi, iru al la proksima urbo, kie estas kuracisto. Li certe povos resanigi la birdeton.

La bestoj de la arbaro longe cerbumis, kiun sendi al la vilaĝo. Fine la leporeto anoncis sin, ke ĝi

volonte parolos kun la kuracisto. Ja ĝin ĉiu ŝatas en la vilaĝo, ĉar paskofeste ĝi portas ruĝajn ovojn kaj donacojn por la infanoj.

La bestoj esperoplene akompanis ĝin ĝis la rando de la arbaro kaj ili ĥore diris:

--Multe da sukceso! Revenu kun la sinjoro doktoro.

La kuracisto unue tre surpriziĝis, kiam li ekaŭdis la strangan peton. Sed li estis bona homo, kaj volis helpi al la birdeto. Ili ekiris reen al la arbaro.

Estis granda ĝojo, kiam la bestoj ekvidis la leporeton kun la kuracisto.

--Kie estas la malsana birdeto? – demandis la kuracisto.

La bestoj montris, ke ĝi estas supre en la nesto. Tiam li malsereniĝis kaj diris:

--Bedaŭrinde tien mi ne povas supreniri. Mi ne povas flugi.

Ekaŭdante tion la bestoj ĉiuj esploris.

--Malfeliĉa birdeto tiam mortos.



La kuracisto kompatis la loĝantojn de la arbaro kaj rapide elpensis ion.

--Mi havas fajrobrigadan amikon – li diris – mi nun tuj telefonas al li. La fajrobrigadanoj havas longan ŝtupetaron. Certe li helpas al ni, se mi petos lin.

La kuracisto el sia kuracista teko elprenis poŝtelefonon. Dume la bestoj ekscitite atendis, kio okazos?

Ili ne devis longe atendi, ĉar la fajrobrigada amiko baldaŭ alvenis kun longa ŝtupetaro.



Li sukcese malsuprenportis la malsanan birdeton kaj la kuracisto povis ekzameni ĝin.

En la lasta momento alvenis la helpo. Vere devis pasi multe da tagoj eĉ semajnoj ĝis la birdeto resaniĝis kaj ĝi denove povis triladi.

Ĝi ege ĝojis, ke ĝi havas tiom bonajn geamikojn, kiuj atentis pri ĝi, kaj ne estis lasita sola.

La bestoj estis dankemaj ankaŭ al la kuracisto kaj la fajrobrigadano. Ekde la resaniĝo la birdeto denove admirinde triladis al la bestoj kaj homoj, kiuj vizitis la arbaron.

**-Onklo Adalberto-**

# Gajaj bildoj

# Gajaj bildoj



*(La fonto de la bildoj: interreto)*